

# EKO 2023

**Pensu globe  
Agu loke  
Por la landa,  
Fakaj kaj  
Regiona  
Laboro**

**Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko**



**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,  
Komercestoj, Blinduloj, Kolektantoj**

**EKO 2023 / 11. Februaro 17, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

## AMO 98 – prelegantoj

De: [edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net) <[redaktanto@edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net)>

En la programo de nia 98-a AMO-Seminario, tuj okazonta okazos la 19-an de februaro (dimanĉo) inter la 14.00 kaj 18.30 (UTC+1) ĉe la platformo ZOOM.

Marija Belošević (Kroatio): enkonduko

Stefan MacGill (Hungario): Oficiala malfermo (eble ankaŭ Duncan Charters)

Mireille Grosjean (Svislando): Amikeco: ni nutru ĝin kiel oni nutras fajron

Reza Kheirkhah (Tajvano): Kiel Esperanto-amikoj ŝanĝis mian vivon kaj riĉigis ĝin

Nina Daniljuk (Ukrainio): Etnaj stereotipoj (antaŭjuĝoj) en la internacia komunikado

Minhao Wang (Ĉinio): Amikeco laŭ mia sperto

Gilbert Ndiokubwayo (Burundo): Amikeco kaj kunlaboro

Okazis prezento de la rezultoj de la foto-konkurso "Amikeco" kaj violona koncerto de Maggy Combot el Reunio.

La aliro estos komunikita al interesiĝantoj ĵus antaŭ la evento.

Maria Belosevic, Kroatio

## Herzberg (la Eo-urbo) kursas

La redaktoro de [edukado.net](http://edukado.net) informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Buntaj Vesperoj en Herzberg

Gvidantonomo: Zsófia Kóródy

Tipo: Nova movada kurso

Loko: Herzberg am Harz, Germanio

Aldoninto: herzbergcentro

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27515>

## Pri la enhavo de IPR 2023/1 (Jarkolekto 53)

- Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) p.3
- Ilona KOUTNY: Novaj magistras studoj por festi la 25-jariĝon de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj p.4
- Enkonduko de la novelo „Antimilitisto” de Lusin (Yu Jianchao) p.7
- La edukistemo en Kebekio (Luigia OBERRAUCH, Zdravka METZ) p.9
- Pri la laborplano de ILEI (Renato CORSETTI) p.14
- Biografio de Mireille Grosjean, la nova Honora Membro de ILEI p.18
- E-o kaj la angla en la 8-a Konferenco de AALA (A. MADELLA) p.19
- Kiel prepariĝi por KER-ekzameno (Judith MEYER, Katalin KOVÁTS) p.22
- Instruisto povas decidi pri la enhavo de multaj ekzercoj (GROSJEAN) p.26
- Kiel agadi kun UNESKO? (Didier JANOT) p.27
- El la landoj kaj sekcioj (DE, JP, IT, RS) p.29
  - Germanio: Memorlibro pri Franz-Georg Rössler, iama redakciano de IPR (József Németh)
  - Japanio: Anoj de la Saitama Esperanto-Societo en Japanio legis la novelon (ISIKAWA Tieko)
  - Italio: La grupo „G. Canuto” de Parma en Italio festis la Zamenhofan Tagon (Cosetta BERNARDI)
  - Serbio: Komuna legado en retkurso por komencintoj (Radojica PETROVIĆ); Atestiloj kaj E-kultura programo en Beogrado (Aranka LASLO)
- Nova membro-administranto de ILEI (Ahmad R. MAMDUHI, Hamzeh SHAFIEE) p.34
- Informoj pri ILEI, adresaro de sekcioj, reprezentantoj, kontaktpersonoj p.35

**Sur la titolpaĝo:** Mireille Grosjean, la nova Honora Membro de ILEI (vd. p. 18)

**Sur la dorskovrilo:** Interlingvistikaj Studoj de la Adam-Mickiewicz-Universitato

Jozefo Németh, redaktoro

--

## AMO 92 bis en Guantanamo, Kubo

Unuafoje en la longa historio de la AMO-programo, AMO-seminario okazis en du malsamaj datoj kaj du malsamaj urboj. La unua parto de AMO 92 okazis en la ĉefurbo, Havano; la dua parto okazis du monatojn poste en la orienta urbo Guantanamo. Tio okazis pro la restanta efiko de Kovido, kiu malfaciligis vojaĝadon. La provincaj homoj ne povis facile vojaĝi, do la seminario ĝuis manifestiĝon en orienta provinco. Legu la alkroĉitan raporton, ricevitan ĵus el Kubo. La informo jam aperis en la marta revuo *Esperanto*.

## Turka komunikado kun ekstero

Pri Esperanto en la ĵurnalo. Milliyet.

Ligilo al la retejo de Milliyet

<https://www.milliyet.com.tr/gundem/goz-doktoru-icat-etti-ana-dili-gibi-konusan-turkler-anlatti-iste-esperantonun-sirri-6894932>

Ligilo al la retejo de Esperanto Turkiye

<https://esperantoturkiye.wordpress.com/2023/02/04/goz-doktoru-icat-etti-ana-dili-gibi-konusan-turkler-anlatti-iste-esperantonun-sirri/>

Vasil Kadifell

## Etiopia televido raportas pri Esperanto

Nia etiopa pioniro Habtom Htesfamicael estis intervjuita ĉe la etiopa televido en la tigrelingvo. La dissendon vi trovas en lia paĝo en fejsbuko:

<https://www.facebook.com/htesfamicael.minash>

La televida stacio sendis al mi la paroladon. Multaj estas demandantaj min en la angla, tigrelingvo aŭ amhara, kaj mi respondas angle. La nombro de la anoj de la ligo por la universala helpa lingvo estas grandiganta ĉiu-tage.

Habtom, etiopa esperantisto

## Por facilaj legaĵoj, uzu <uea.facila.org>

Ekzemple

<https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/kial-estas-sep-tagoj-en-semajno-r344/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/nov-jara-festo-r345/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/nekonataj-vidinda%C4%B5oj-la-polento-tran%C4%89a%C4%B5o-r333/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/movado/konstruistoj-esperantistaj-r346/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/la-lanterna-festo-r348/>

## Padova kurso

De: [edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net) <[redaktanto@edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net)>

La redaktoro de [edukado.net](http://edukado.net) informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.:

Nomo: Praktika kurso de la lingvo esperanto

Gvidantonomo: Paola Tosato

Tipo: Nova movada kurso

Loko: Padova, Italio.

Aldoninto: PaolaT

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27513>



**EUROCALL estas la plej grava eŭropa tegmenta asocio kaj konferenco pri teknologio kaj lingvolernado.** Duncan Charters: Mi ĉeestis tiun de Padovo en 2015. Bona forumo, kie mi havis utilajn konversaciojn kaj spertis senantaŭjuĝan intereson pri Esperanto. Mi foje prezentis en la parenca usona asocio, sed ne povis ĉeesti lastatempe. Derek Roff estas fidela apoganto de CALICO, kiu ĉiujare donas premion Esperanto (de ESF) por la plej bona lingvoretejo de la jaro. Tio venas kelkajn tagojn post la fino de la komuna kongreso de ILEI-TEJO (15-18 de aŭgusto), do eblas por ĉeestantoj. Tamen en Islando (kvankam ekzistas rabatflugoj per la du islandaj aerlinioj). Kredeble Islandon oni elektis ĉar eblas allogi partoprenantojn ankaŭ el Ameriko, pro la malaltkostaj flugoj.

**Notu ke la limdato por submeto de proponoj por prezentadoj estas la 1-a de marto.**

Simpozio estus ideala, sed bezonus almenaŭ tri partoprenantojn. Bedaŭrinde pro aliaj respondecoj kaj la kosto estus malfacile por mi partopreni. Espereme ke iu povos nin reprezenti, Mi supozas ke ni ne havas reprezentanton de ILEI en Islando, sed bonvolu kontroli. (SMG: Eĉ UEA ne plu havas tian)

Bonvolu atenti ke en la venontaj semajnoj mia komunikado estos limigita por povi fini tradukprojekton por kiu mi estas komisiita.

Duncan Charters, [lingvo@aol.com](mailto:lingvo@aol.com)

===== vortoj: 830 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de post 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.